# Boletin

de la Federación Española de Esperanto



N-ro 315 - MARTO - APRILO - 1994

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

## Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9º C
ES-50002 Zaragoza

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andres Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández

**Federación Española de Esperanto**
(Información y administración)

**Hispana Esperanto-Federacio**
(Informado kaj administrado)

Rodríguez San Pedro 13-3º-7
ES-28015 MADRID
Telefono + faksilo: +34-(9)1-446-80-79

## Estraro

*Prezidanto*: Antonio Alonso Núñez
*Sekretario*: Marcos Cruz Martín
*Vicprezidanto*: José Mª Galofré Domingo
*Kasisto*: José Mª Bernabeu Franco
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)


*Kovrilo:* Interno de Alkazabo en Malago

*Noto:* Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## ENHAVO


Alvoko *A. Alonso kaj Marcos Cruz* . . . . . 3
HEF agnoskita de la ŝtato *Juan Carlos Ruiz* . . . . . 4
Nekrologoj . . . . . 7
Viglas la movado . . . . . 8
La forto de la amo *A. Marco Botella* . . . . . 12
Libroservo (ofertoj) . . . . . 15
Deziras korespondi . . . . . 15
Atentu! . . . . . 16
1994, jaro de la familio *Luis Serrano Pérez* . . . . . 17
Ni estas jam eŭropaj civitanoj *Rafaela Urueña* . . . . . 19
Pekoteko pekas pri la paronimoj apartamento/apartemento *Bernard Golden* 20
Vidi ligneron en okulo aliula... *V. Hernández Llusera* . . . . . 23
La Coruña, reago al propono de Bernard Golden *Georgo Kamaĉo* . . . . . 25
Pri dialogoj kaj aliaj temoj *Fernándo de Diego* . . . . . 27
Recenzoj: Esperanto-katalogo de UEA *Miguel Gutiérrez* . . . . . 29

# Alvoko!

## AL LA PREZIDANTOJ DE ĈIUJ HISPANAJ ESPERANTO-GRUPOJ

La Estraro de Hispana Esperanto-Federacio, pere de ĉi-cirkulero, havas la plezuron oficiale inviti la prezidantojn de ĉiuj esperanto-grupoj kaj asocioj de Hispanio, aŭ ties akreditajn reprezentantojn, al komuna debato pri la nuno kaj estonteco de la hispana esperanto-movado, en kunveno okazonta la 17an de julio 1994 (dimanĉo) je la 10a matene, kadre de la 53a Hispana Kongreso de Esperanto en Malago.

Tial do, cele al konvena antaŭpreparo de la debato, Hispana Esperanto-Federacio proponas, ke ĉiuj asocioj kaj grupoj preparu dosieron klarigantan siajn mankojn, aspirojn, problemojn kaj eventualajn solvojn al ili. La dosieron ili devas sendi al la oficejo de Hispana Esperanto-Federacio ĝis la 30a de aprilo.

Pere de ĉiuj ricevitaj dosieroj, la sekretario pretigos kiel eble plej ampleksan dokumenton, kiun li disponigos sufiĉe antaŭtempe al la partoprenontaj asocioj kaj grupoj, por ke tiuj konvene preparu la definitivan kunvenon de Malago.

Ene de la kongreso, la kunvenantoj rajtos decidi la kreon de unu aŭ pluraj laborgrupoj, kiuj devos diskuti la definitajn temarojn. La konkludoj estos la bazo por la difino de realisma laborplano.

Cele al orientigo de la debato okazonta ene de ĉiu grupo, ĉi-folie aliflanke ni aldonas la titolojn de la diversaj punktoj, kiuj konsistigas la "Strategia Plano de Hispana Esperanto-Federacio, pasintjare aprobitan de la HEF-estraro.

Se vi havas dubojn aŭ bezonas pliajn informojn, la sekretario restas je via dispono marde kaj ĵaŭde de la 19a ĝis la 20a horoj en la oficejo de HEF, plus foje sabatajn vesperojn. Ankaŭ eblas uzi la respondilojn aŭ la faksilon por kontakti.

Atendante vian akuratan reagon, sincere salutas vin

*Antonio Alonso, Prezidanto /, Marcos Cruz, Sekretario*

La dosierojn oni sendu prefere en (resendota) komputila diskedo, en formato de WP-dokumento aŭ simpla ASCII-fajlo. Se tio ne eblus, sendu ĝin tajpita sur folioj A4. Dankon.

La tekston de la apuda paĝo estas parto de cirkulero sendita al ĉiuj hispanaj Grupoj kaj Asocioj; tamen la estraro pretas preni en konsidero ĉiujn sugestojn kaj proponojn de la membroj de la Federacio, se ĝuste formulitaj kaj alvenintaj al la oficejo de la Asocio ene de la tempo antaŭe difinita.

# HEF agnoskita de la ŝtato

## faritaj paŝoj kaj ontaj perspektivoj

Post la sukceso atingita, kaj pro ĝia historia intereso, mi opinias, ke valoras la penon rememori la paŝojn faritajn por akiri la oficialan deklaron de la Ministra Konsilantaro.

En 1986, Madrida Esperanto-Liceo (M.E.L) vivis orajn tagojn. Koincidis en la tempo kaj la spaco multaj laboremaj kaj efikaj esperantistoj kiel geedzoj Casquero, geedzoj Fighiera, Lupe Sanz, J. Camacho, M. Fernández, C. Musazzi, P. Vilarroig, J. Fernández Arroyo, D. Keef, M. A. Sancho, J. Navareño, J. M. González Aboín, J. F. Platas, kaj longa cetero de juvelaj bazaj homoj, sen kiuj asocio ne povas funkcii.

Multaj gelernantoj vigligis la etoson de la asocio, kaj en la merkredaj "konversaciaj rondoj" ideoj abundis. Unu el tiuj ideoj konsistis en la studado de la leĝoj pri asocioj de 1964 kaj 1965, kaj vidi ĉu MEL povos ricevi kaj profiti de la titolo "Nacia Asocio de Publika Utileco". Ankaŭ oni deziris koni ĝisfunde la avantaĝojn liveratajn de la leĝo. Nu, por tion esplori, mi vizitis la Ministerion pri Internaj Aferoj. Tie, mi hazarde renkontis iun s-ron Silva, funkciulon preskaŭ emeritan, kiu simpatias Esperanton.

La aŭskultis atente mian priskribon de la movado en Hispanio, kaj sugestis ne perdi forton kaj koncentri la tutan agadon en la kadro de Hispana

Esperanto-Federacio, sendepende de tio, ke ĝi estu ĉiam, aŭ ne, la iniciatinto de la diversaj aferoj. "Temas —diris s-ro Silva— pri "vendado" de la ekstera bildo de organizita nacia asocio. Poste, oni povas ekspluati la dekreton je la nivelo de regionaj kaj lokaj grupoj".

MEL do akceptis la "perdon de ĉefrolo" favore al HEF, kaj ĝi motoris la kampanjon "HEF: Asocio de Publika Utileco". Tiu kampanjo disvolviĝis jene:



1.—Difino de strukturo de la baza dokumento prezentota. Ĝin faris G.C. Fighiera kaj mi mem kiel kunordiganto. Ĝi konsistis en du partoj: Ĝeneralaj valoroj de Esperanto, kaj Esperanto en Hispanio, ambaŭ kun ses fakoj. En la hispana parto oni rimarkigis kaj emfazis la rolon de HEF kiel kanalizanto de la tuta agado.

2.—Kreado de reto de kunlaborantoj kaj disdivido de la taskoj: redaktado kaj kompilado de datumoj koncerne al la diversaj fakoj. La baza, entuziasma laborteamo konsistis el: G.C. Fighiera, J.C. Ruiz, M.R. Urueña, A. Alonso, J. Azcuénaga, L. Hernández-Yzal, A. Marco, Lupe Sanz, J.M. Bernabeu kaj J. Régulo. Aparte menciindas, ke por difinitaj aferoj oni ricevis kontribuojn de pluraj esperantistoj kiel Ada Fighiera, Inés Gastón, M. López, A. Casquero, J. Navareño kaj S. Aragay (mi pardonpetas pro eventualaj forgesoj).

3.—Eldono, danke al subvencio de la Madrida Ŝparkaso, de la baza dokumento titolita "Datos Acerca del Movimineto Esperantista 1887-1987" (aprilo 1987). Ĉi tiun dokumenton, kun formato de dekpaĝa kajero, ricevis senpage la ĉeestantoj de la Hispana Esperanto-Kongreso en Madrido, 1987.

4.—Pluraj kaŭzoj postulas trijaran atendo-periodon:
a) Preparo de la kompleta dosiero (kun grandega helpo de L. Hernández-Yzal).
b) Delikata operacio de la kunordiganto, J.C. Ruiz (neniu deziris anstataŭi lin por la daŭrigo de la projekto, malgraŭ lia insisto).
c) Politika situacio ne favora, ĉar oni atendis ŝanĝojn de la dekreto kaj, konsekvence, de la bezonataj kondiĉoj.

En la naciaj kongresoj de tiuj tri jaroj (Valencia, Bilbao, San-Cugat), oni daŭre pridiskutis la temon, kaj la du sinsekvaj Prezidantoj de HEF, s-ro S. Aragay kaj s-ro A. Alonso, sugestis atendi pli oportunan tempon por prezenti la dokumenton ĉe la Ministerio de Internaj Aferoj.

5.—Tial ke la situacio ŝajnis pli favora, kaj por ne perdi la eĥon de la Jubileo de Esperanto, La HEF-Prezidanto, A. Alondo, petis al la kunordiganto de la projekto prezenti la dokumenton al la Registaro, kio okazis en oktobro 1990.

6.—Kiel sciate, tri jarojn poste, supozeble danke al la favorega impreso de grava aŭtoritatulo de la Kultura Ministerio, kiu vizitis la Universalan Kongreson de Valencio, kaj raportis pri ĝi, la administra procezo malblokiĝis, kaj HEF finfine ricevis la titolon "Nacia Asocio de Publika Utileco".

Ĉiu hispana esperantisto ĝojis, kiam oni ekkonis la rezolucion de la Hispana Ministra Konsilantaro. La ekzakta dato estis la 27a de aŭgusto de 1993, unu monaton post la UK en Valencio.

Tio signifas gravan rekonon de la valoro de la Esperanta movado. Efektive, la deklaro venas el la plej alta instanco de la lando, kaj ĝi agnoskas la gravan rolon de HEF en la disvastigo de la hispana kulturo. Interalie, la titolo ricevita donas al HEF jenajn rajtojn:

a) Uzi ĝin en ĉia dokumento, post la nomo de la Asocio.
b) Ĝui la specialajn kondiĉojn, kiujn la hispana leĝoj donas al tiaj Asocioj.
c) Havi prioritaton en la ricevado de ŝtataj subvencioj.
ĉ) Ricevi teknikan kaj konsilan helpon de la administra Registaro.
d) Esti konsultita de la Registaro en la preparo de ĝeneralaj disponoj rilate al Esperanto.

Lastatempe, malmultaj asocioj sukcesis akiri la titolon "Asocio de Publika Utileco" je nacia nivelo. Kaj preskaŭ ili ĉiuj havas gravan, agnoskitan socikulturan rolon: Ruĝa Kruco, Afanias, Ateneo... Ĉio ĉi devus instigi nin, hispanaj esperantistoj, helpi la agadon de HEF, por ke ĝi daŭre estu je la nivelo de ekstera rekono ĵus atingita. Por tion realigi, konvenos prezenti la diversajn aktivaĵojn de la grupoj kiel agadon faritan en kunlaboro kun HEF. Nacia strategio por plifortigo de HEF, sen perdo de la ĉefrolo de la grupoj, meritus debaton en venonta kongreso aŭ en faka kunsido. En tiu forumo oni povus ankaŭ diskuti la teknikajn aspektojn kaj favorajn eblecojn de la dekreto 1440/1965 (B.O.E. 7/Junio/1965) por ĉiuj hispanaj grupoj.

*Juan Carlos Ruiz*

dumonata kultura E-revuo

Survoje

petu provekzempleron: Ukrainio, 335057 Sebastopolo-57, p/k 168

# NEKROLOGOJ

Kun bedaŭro ni informas pri la forpaso de nia kara samideano Sacramento COLLADO LLANA,(1910-1994), okazinta la 23an de Februaro. Honora Membro de Astura Esperanto-Asocio kaj veterana esperantisto, ja li esperantistiĝis dum la lerneja kurso 1927/28 en la Normala Lernejo por Instruistoj de Oviedo. En 1951 li fariĝis membro de HEF kaj en 1952 de "La Verda Kolombejo" de El Entrego, la unua Esperanto-Grupo en Asturio post la intercivitana hispana milito. Li partoprenis en multnombraj naciaj kongresoj, en ekspozicioj kaj prelegoj kaj kunlaboris en diversaj E-ĵurnaloj kaj revuoj, inter ili en "Heleco" dum pluraj jaroj, kaj en Radio Junularo de Langreo (Asturio) ĉiam pri la temo *Esperanto*. Peranto dum kelkaj jaroj de esperantaj revuoj li estis ankaŭ Delegito de UEA pri Instruado en Sama de Langreo (Asturio). Preta labori ĉiam por Esperanto li devis tamen rezigni tian gravan taskon dum ĉi lastaj jaroj pro gravega okulmalsano.

Nian kondolencon al liaj gefiloj kaj ceteraj familianoj. Li pace ripozu!

*Santiago Mulas*

Kun sama doloro ni informas pri la forpaso en Valladolid, la 5an de pasinta januaro, de nia samideano Carlos CASTAÑON ADALIA, aktiva membro de la loka Grupo "Fido kaj Espero" kaj de Hispana Esperanto-Federacio. Li ofte partoprenis en niaj naciaj kongresoj, kaj en ĉiu grava loka esperantista aranĝo.

Nian kondolencon al lia familio. Li pace ripozu!

*L. Hernández*

## A. SALETE kaj D-ro OLAVIDE, omaĝitaj

En la oficiala sidejo de la Esperanta Societo "FRATECO" de Zaragozo okazis la 20an de Februaro omaĝa kunveno honore al la forpasintaj membroj de nia asocio s-ro Angel SALETE kaj D-ro José OLAVIDE, du modelaj esperantistoj.

La aranĝo konsistis en legado de kelkaj pecoj el la propraj "Memoraĵoj" verkitaj de s-ro Salete, kiun sekvis kolokvo pri ambaŭ elstaraj esperantistoj. Kun emocia parolo, samideano A. Valén legis tiujn viverojn plej dramajn travivitajn de s-ro SALETE en la batalkampo dum la intercivitana hispana milito, en la francaj koncentrejoj tuj post la malvenko de la respublikanoj aŭ kiam, ekzilite, li travivis la mortdanĝerajn horojn de la germana okupacio en Francio. Kune kun tiuj impresaj rakontoj, vere doloraj, oni aŭskultis ankaŭ tiujn aliajn pecojn profunde humanajn kaj serenajn, en kiuj li prikomentas sian idearon kaj strebojn pri la Esperantismo kaj sian opinion pri progresema socio kaj homamaj principoj.

Tuj post la legado de tiuj beletraj pecoj sekvis kolokvo pri la omaĝatoj spontane malvolviĝita de tiuj, kiuj estis iliaj kompanoj en nia rondo, kaj oni aŭdis mil kaj unu anekdotojn kaj diversajn dankoesprimojn pro la oferema tasko de ambaŭ homoj en la Grupo, kiel gvidantoj de kursoj ĝis sia vivofino.

Samideano A. Marco elvokis la eksterordinaran kontribuon de ambaŭ esperantistoj en la seminarioj okazintaj en nia sidejo dum tri sinsekvaj jaroj. Neniam mankis en tiuj kunvenoj la beletraj kontribuoj de ambaŭ: simplaj, teneraj kaj realismaj, la verkoj de SALETE; erudiciaj, profundaj, brilaj, tiuj de D-ro OLAVIDE. Malfacile oni povas forgesi la strebadon de nia kara doktoro en la organizado de la biblioteko de nia Centro, kaj sendube ni bone profitis lian sperton en tiu kampo: ja ne vane li posedis, ne nur bonegan bibliotekon de libroj en la hispana lingvo, sed ankaŭ la plej kompletan Esperanto-bibliotekon privatan de nia lando. La verkanto de tiu ĉi kroniko neniam dankos sufiĉe la helpon kiun li ricevis de D-ro Olavide, ne nur per pruntado de esperantaj libroj, sed precipe per notoj manskribitaj, konsilante, kritikante,

sugestante pri ne gravas kiaj esperantaj temoj, kiujn tre ofte mi submetis al lia konsidero kaj talento. En mia privata arkivo mi gardas tre zorge, kiel tutvaloran trezoron, centojn da manskribitaj paĝoj, kiujn mi de tempo al tempo ŝatas relegi.

La partoprenantoj en tiu kunveno pasigis agrablajn momentojn aŭskultante aŭ esprimante sukajn komentariojn pri ambaŭ elstaraj esperantistoj...

Kamaradoj Angel SALETE kaj José OLAVIDE, viaj kompanoj de "FRATECO" tute ne forgesas vin!

## Simpozio pri Esperanto-Turismo


En Bydgoszcz okazos la 10a Internacia Simpozio, de la 30a de aprilo ĝis la 6a de majo. La temo de la Simpozio estos: "La rolo de la kulturo en la integriĝo de Eŭropo kaj de la mondo" kaj oni organizas tiun aranĝon kune kun la 19aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz kaj kun la 9a Junulara Festivalo de Esperantaj poezio kaj kanzono.

Kunorganizanto kaj subvencianto estas la Urba Fako pri Kulturo en Bydgoszcz kaj la Historia Instituto de la Pedagogia Altlernejo gvidata de prof. d-ro Adam Sudol. Samtempe la Akademio Internacia de la Sciencoj de San-Marino okazigos studsesion. Informoj: Esperantotur, ul M.Sklodowskiej-Curie, 10, PL-85-094 BYDGOSZSZ. Pollando.

## La 46a IFEF-Kongreso

La Fervojistoj kongresos de la 13a ĝis la 20a de majo en KREMS (Aŭstrio). Interesa programo jam estas pretigita kun du ekskursoj. La Postkongreso okazos en Breclav (Ĉeĥio) de la 21a ĝis la 24a de majo. Informoj: 46-IFEF-Kongreso, Pf. 194, A-3101 St. Polten. Aŭstrio.

## 13a Internacia Literatura Forumo



*Bratislabo 1994*


Ĝi okazos en Bratislavo (Slovakio) organizita de Koop. de Literatura Foiro kaj Bratislava Esperanto-Klubo, de la 2a ĝis la 6a de Julio 1994. La Forumo estos dediĉita al la temo:"La Esperanto-Kabareto". Krom prelegoj pri la anoncita temo, okazos artaj prezentoj kaj ekskursoj. Informoj: Esperanta PEN-Centro, H-1581 Budapest, Pf.193.

## Premio ANDREU NIN.

La Urbestraro de El Vendrell, kunvokas la Premion Andreu Nin, kiun oni aljuĝos al esplora verko aŭ tezo pri sociaj kaj politikaj temoj, verkitaj en kiu ajn lingvo. Povas partopreni en la konkurso ĉiuj neeldonitaj verkoj. La fina dato por prezentado de originaloj estos la 31a de decembro 1994.

La Premio konsistos el 1.000.000 da pesetoj. Informoj: Urbestraro de El Vendrell. Area de Cultura-Cal Guimerá. C/Santa Ana, 8. 43700-EL VENDRELL.

## Gratulesprimo




La Redakcio de "Boletín" sendas tutkoran gratulesprimon al la angla advokato Frank Buckley, okaze de lia okdekjariĝo la 16an de junio, 1994. S-ro F. Beckley, verkinto de pluraj komediaj teatraĵoj kaj komponisto de kanzonoj, estas esperantista pioniro, kiu prelegis kaj vizitis nin en Sant Cugat del Vallés en la jaro 1984.

Feliĉan okdekjariĝon, kara amiko!!

## 43a Kultura Semajnfino

Organizita de Sarlanda Esperanto Ligo, ĝi okazos de la 29a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1944 en la Kardinal-Wendel-Domo: Enkonduka kurso por komencantoj. Parolaj kaj legaj ekzercoj por progresantoj. Stilistikaj kaj literaturaj ekzercoj. Ĉiuj kursoj gvidataj de prestiĝaj instruistoj. Informoj: Kardinal-Wendel-Haus. D-66424 Homburg/Saar. Germanio.

## Du prelegoj pri Esperanto

Organizitaj de "KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA" (KAE), ili respektive okazis, en la Autonoma Universitato de Barcelono, la 2an kaj 8an de marto nunjara, sub la titoloj "Esperanto en nia tempo", fare de s-ano Giordano Moya Escayola, kaj "Esperanto, la Internacia Lingvo", parole de s-ano Martí Guerrero i Cots.

La ĵurnaloj "Diario de Terrassa" kaj "Diari de Sabadell" koincide raportis pri ambaŭ Esperanto-prelegoj, kaj krome tiu lasta periodaĵo aldone publikigis, en du apartaj tagoj, la koncernan foton kun la parolanta samideano. Ankaŭ la televizia stacio de la urbo Sabadell, en plej oportuna horaro por ĝiaj gespektantoj, prezentis filmitajn momentojn el la prelego de s-ano Giordano Moya. Siavice "Radio Sabadell", kun simpatia komentario, favore reliefigis tiun Universitatan eventon, organizitan de la

loka KAE-Delegacio, kiun prezidas J.M-a Galofré Domingo.

El tiu resona, tra la Barcelona Universitato, distrumpetado por Esperanto rezultis, ke la Katalunregiona Televizio *TV 3* poste intervjuis samideanojn Giordano Moya, M.Guerrero kaj L.M-a Hernández Izal kaj sekvatage, la 11-an de marto, la sama televizia skipo sekve vizitis, en Barcelono, la "Libro-vendejon Esperanto", kun kies direktoro, s-ano Salvador Aragay, oni vigle konversaciis pri esperantistaj temoj.

---

**Prelego pri Esperanto en Reus**

Organizita de Kataluna Esperanto-Asocio prelegis la 11an de marto pri Esperanto en "Centre de Lectura" de Reus nia samideano Salvador Gumá i Clavell, Honora Membro de HEF.

En bela salono estis instalita interesa ekspozicio, ĉ. 40 grandaj afiŝoj kun tekto klara kaj kelkaj desegnoj, altirantaj la vizitantojn. "Centre de Lectura" konservas tradician simpation al Esperanto: ja dum la dua jardeko de tiu ĉi jarcento ĝi estis fokuso de Esperanto en REUS.

*MALOFICIALE ANTAŬKONGRESU EN USONO!*

8-16 julio — Universitato de Hartford, Connecticut
Prezidanto: d-ro Humphrey Tonkin
Instruistoj: Špomenka Stimec, Boris Kolker
Proks. prezo: US$407, inkluzivas klasojn, loĝadon en la universitato, du tuttagajn ekskursojn al Novjorko kaj Bostono, piknikojn kaj programojn ĉe la universitato (ne manĝojn!).

9-15 julio — San Francisco Ŝtata Universitato
Instruistoj: d-ro Duncan Charters, Stefan MacGill
Proks. prezo: US$487, inkluzivas klasojn, loĝadon en la universitato, tri manĝojn tage, ekskursojn kaj abundan programon ĉe la universitato.

Post la kursoj, ĉiuj iru al la usona landa kongreso de Esperanto en Sacramento, la ĉefurbo de Kalifornio.

Eŭropaj kaj Aziaj esperantistoj povas uzi la tarifon "vizitu Usonon" por flugoj ene de Usono, aŭ aĉeti ĉirkaŭmondan bileton. TWA kaj Korean Air vendas la plej malmultekostan kombinaĵon. Detaloj haveblas ĉe: Esperanto Vojaĝ-servo / 6104 La Salle Ave., Oakland CA 94611 U.S.A / tel: 510-339-2001.

# La forto de la amo

Antikvaj kronikoj rakontas, ke iam, dum la regado de la dinastio Banü Hüd (1040-1142) de Saraqusto (Zaragozo), ekzistis en tiu urbo juna judodevena poeto, kies amo al la tradicioj kaj religio hebreaj estis tiel grandaj, ke li fervore revis pri la promesita tero kaj la sankta Jerusalemo, kaj siajn plej belajn versojn li dediĉis al la riveroj Ebro kaj Jordano. Li naskiĝis en la juda kvartalo de Saraqusto kaj lia nomo estis Abü-l-Fald ibn Hasdäy al-Islami, kaj li estis tiel pure hebrea, ke oni povas diri, ke lia familio devenis el Moseo mem...

Subite li enamiĝis al bela knabino, kaj ne plu ekzistis en li alio ol tiu belulino, kaj la poezio por kanti ŝian belecon, kaj lia fervoro por ne forgesi ŝian figuron tage kaj nokte, kaj la rimedoj por atingi ŝian komforton. Resume, lia amo al ŝi estis tiel granda, ke li ne sciis vivi ne pensante pri ŝi kaj strebis komplezi eĉ ŝiajn plej etajn dezirojn. Kaj li rezignis kredi je sia religio kaj fariĝis muzulmano, samkiel ŝi, nur kiel plian pruvon pri lia profunda amo al ŝi.

La poemoj de la juna Ibn Hasdäy fariĝis popularaj kaj tiel plaĉis al la reĝo al-Muqtadir (1046-1082), ke la poeto ricevis inviton de la suvereno veni en lian palacon kaj resti, unue kiel poeto de la kortego, tuj poste kiel veziro. Liaj versoj sukcesis en la kortego kaj estis ripetataj de la popolo. Kvankam estis multaj aliaj bonaj poetoj en la kortego de Saraqusto, neniu kiel li sciis pli lerte priskribi verse la festojn en la Alĵaferia palaco (**) aŭ sur rivero Ebro, ĉar, efektive, simile al tiuj festoj, jam famaj okazintaj en la Seviljo de al-Mutamid sur rivero Gvadalkiviro, aŭ sur diglago proksima al Kordovo, aŭ sur la rivero de Silves, oni alkutimiĝis ankaŭ en Saraqusto efektivigi sur ŝipetoj festojn, aŭ noktajn beletrajn kunvenojn, aŭ muzikajn recitalojn...

La kronikisto Fath ibn Jaqän rakontas unu el ili dum la regado de al-Mustain, kaj lirike eksplikas:

"La ŝipeto de la princo estis ĉirkaŭita de multnombraj barkoj; la melodio de la kordinstrumentoj (precipe liutoj) belis tiel, ke la navigantoj sin sentis devigitaj halti por ĝui la magion de tiuj sorĉaj muzikoj, kaj ofte mutiĝis eĉ la plej mirindaj birdokantoj. Trompe, oni eltiris la fiŝojn el akvoprofundaĵo, kaj la fiŝokaptistoj aperigis ilin antaŭ ĉies okuloj kvazaŭ bukedon de perloj aŭ orajn fandobrikojn"...

Ibn Hasdäy, kutime partoprenanta kun la reĝo en tiuj festoj aŭ sportaj promenadoj sur Ebro, priskribas tiel bele unu el ili:

Ho, mirinda bela tago!
kiel brila je tagmezo,
ĝi sin montris vivkolora
per la oro kaj arĝento
forrabitaj de tagiĝo
kaj de sunradi-vespero!
Oni dirus, ke, indulge,
nun denove la vetero
nin deziras rekompenci
post ventego kaj tempesto.

Ni remadis sur boato
ĉirkaŭite de ŝipetoj,
kaj sur ili scivoluloj
rigardadis nin sen ĝeno,
ja ne vane kun ni estis
homo de plej altrangeco.

Temis ja pri princ' Mustain,
kiu regas nian regnon
ricevitan de Mutamin
post Muqtadir, gloraj reĝoj.
Mirindaĵo enfermiĝis
en la ŝip' de l' suvereno:
vera mar' ekzistis ene
de la tutpotenca Ebro!

El la fund' de l' riverakvo
fiŝkaptistoj kun lerteco
per trompart' eltiris fiŝojn,
kiuj brilis kvazaŭ perloj,
kiel brilas la naĝantoj
alsaltante al rivero.

L'invititoj sur la ŝipo
trinkis vinon en la festo
kun la gust' de trink' sur lipoj
de l' virin' de niaj revoj,
eskvizita kiel kiso
kun plezur-reciprokeco!

Oni trinkis je la sano
de sinjor' kun karaktero
milda kiel bela floro,
delikata la mieno,
kies bril' superas lunon
kaj parfumas nian penson.

En alia poemo Ibn Hasdäy ludas fantazie kun la nuboj, kun la suno, kun la genioj, kaj tiel li verse esprimas siajn lirikajn ideojn:

I

Tiuj nuboj nin ĝojigis
envolvitaj per veluroj
de plej belaj blondaj haroj
de la ridetanta suno;
inter ombroj kaj mokŝercoj
kaŝis sin la suno-lumo
kaj hontigis l' astro-reĝon
la naiva ombro-ludo.

II

Vidis tuj ni la genion
streĉi sian dian arkon
kaj sur neĝo ĵus falinta
trafe pafi sian sagon
sur l' imagon fantazian
de alloga miraĝĉarmo.

Mezepokaj kronikoj de Ibn Said rakontas belege pri la fabela vivo de la poeto Ibn Hasdäy, riĉa je mil kaj unu anekdotoj, kiuj senerare proklamas, kiel granda estis la amo de la poeto laŭlonge de sia vivo al la ĉarma amatino: la forto de lia amo al ŝi montriĝis tute nebremsebla!

Ibn Hasdäy, erudiciulo pri aritmetiko, geometrio, astronomio kaj poezio, unu el la homoj plej inteligentaj el lia epoko, veziro de tri saraqustaj reĝoj, viro kun granda talento kaj teneraj sentoj, kiu ŝanĝis sian religion pro amo al virino, forpasis en Saraqusto dum la regado de al-Mustain (1085-1108), kaj lia memoro ankoraŭ vibrigas niajn korojn per delikataj sentoj de admiro kaj estimo.

*Antonio Marco Botella*

(*) Ĉi tiun rakonton mi eltiris el mia verko "Lirikaj perloj de Al-Andalus".
(**) Alĵaferio: araba palaco konstruita en la 9a jc. ankoraŭ ekzistanta en Zaragozo, vizitebla kaj vizitinda.

---

## HELPU 16-JARAN MALSANULON

Nia redaktejo ricevis kor-preman helpopeton de Aleksej NIKULIN, 16-jara knabo el Murmansko (Rusio), kiu jam de 12 jaroj ne plu povas piediri, movi krurojn kaj brakojn kaj normale vivi. Kiam li estis 4-jara infano, trafis lin *progresiva muskola distrofio*, kiun oni diagnosis nekuracebla kaj mortiga. Tamen antaŭ unu jaro li legis en medicina revuo, ke tiun turmentan malsanon eblas kuraci en la Stenforda Universitato (Usono), kvankam la operacio kostas plurajn cent-milojn da dolaroj. Espero denove ekbrilis liakore, sed Aleksej ne disponas tiun monon por kontraŭbatali la morton. Li do kuraĝas peti samideanan helpon kaj apogon.

Bonvolu sendi usonajn dolarojn al: Ŝpara Banko de Rusio, Kalkula konto N-0730000028; por Murmanska banko N-06500041, al Lenina fako, konto N-6500114001 je la nomo de NIKULINA NINA ALEKSEJEVNA. La adreso de la malsanulo estas: Rusia Federacio, 183038 MURMANSKO, Privokzalnaja, 20,-8. ALEKSEJ NIKULIN.




## ATENTU LA OFERTOJN

Ibere libere . . . . . . . . . . 2.500

Poemo de Utnoa . . . . . . . 3.255

Sferoj-8 . . . . . . . . . . . . 1.000

Cigana romancaro . . . . . . . 545

La arbo de la sciado . . . . 1.475

## SUPEROFERTO

Tirano Banderas . . . . . . . 1.000

Sendube... unikaĵoj!

Jam aperis dua eldono de **La Majstro kaj Martinelli**, satira novelo de Georgo Kamaĉo. La eldonisto prezentas ĝin jene: *En ĉi verko, lingvo-tavoloj egalas al ĵongla aŭtora stil-ekzerco kaj —eble unuafoje en nia originala literaturo— groteska troigo kaj karikatura misformo ricevas beletran valoron.*

**La Majstro kaj Martinelli** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 925 ptoj

Eld. ILTIS-Eldonejo, Germanujo.ISBN 3-927613-30-4.

---

## deziras korespondi

★ Alĝeria arkitekto lernanto de Esperanto deziras korespondadi kun hispano pri turismo kaj aliaj temoj de li/ŝi elektita. Interesatoj bonvolu adresi viajn leterojn: Monsieur Arrar Khellil. École Émir Abdelkader. Sidi-Bel-Abbes. Algérie.

★ Supera instruistino pri arto, 50-jaraĝa, dez. kor. pri kunlaborado de ŝiaj posedaĵoj. Adreso: Angelina Mihajlova Sotirova. Str. 419, Blok 403, Vhod 2, Apartament 28. 1359-SOFIA-LULIN. Bulgario.

★ Mi kolektas poŝtmarkojn el Hispanujo, de 1992 inkluzive, prefere mi dezirus interŝanĝi pm. kun hispanoj. Mia adreso estas: Eugeniusz Piasecki; ul. J. Matejki, 2. 67400-Wschowa. Pollando.

*Kompletigu vian bibliotekon! Nun...* **Tirano Banderas**

*Mendu tuj vian ekzempleron!*

---

Ni kore dankas al tiuj samideanoj, kiuj sendis jam la petitajn informojn, kaj daŭre insistas por ke ĉiu HEF-ano same reagu kaj ni povu aktualigi kaj kompletigi la HEF-datenaron. Bonvolu do (foto)kopii la jenan slipon, kaj poŝtu aŭ faksu ĝin al la HEF-oficejo, aŭ registru la respondon per la aŭtomata respondilo, aŭ telefonu nin marde aŭ ĵaŭde de 19-a ĝis 20-a. Koran dankon pro la helpo.

Atentu!

*La HEF-Sekretario*

Nomo .................... Familia nomo ..............

HEF-kodo ................ Naskiĝdato ...............

Unua jaro de membreco en HEF ..........................

Hejma telefonnumero (kun regiona prefikso) ..............

Kategorio de HEF-membro (tabelo en Boletín 312, p.5) ............

**Se via adreso sur la koverto de Boletín neĝustas:**

Adreso ...............................................

Poŝtkodo ................ Loĝloko ..................

**Se vi estas individua membro de U.E.A.:**

U.E.A.-kodo ............. Kategorio de U.E.A.-membro .....

Unua jaro de membreco en U.E.A. ........................

**HEF** **(91)-446-80-79**

**24 horojn tage, respondile kaj faksile.**
**Persone: marde kaj ĵaŭde de 19a ĝis 20a**

# 1994, jaro de la familio

La Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke la nuna jaro 1994 estu *LA JARO DE LA FAMILIO*. Mi ne bone scias la kaŭzon, kiu instigis al tiu altranga internacia institucio, kia estas UNO alpreni tiun decidon. Ĉu la familio, kiel natura institucio de nia socio estas en danĝero? Ĉu ĝi perdis siajn tradiciajn valorojn, kiel oni nun komentas, kaj per tiu kampanjo oni pretendas plifortigi ĝin?

Estas evidente, ke la familio estas fundamento de la socio. Neniu socio povas normale funkcii sen tiu baza grupo kaj ĝia etoso. Ĉiu socio konsistas el familioj kaj sin apogas sur ili. Do, la emfazo kaj defendo de la familio estas ja nediskutebla. Se en la familio regas kontenteco, evidentas, ke en la socio, eble kun esceptoj, ankaŭ regas harmonio. Sed la familio ne estas grupo de personoj, kiuj ligite per sama sanga deveno povas izoliĝi, enfermiĝi en si mem. Unu familio estas nur eta branĉo de tiu granda arbo, kiu estas la homaro. Oni povas akcepti, ke en arbo ekzistas branĉoj, kiuj aspektas pli aŭ malpli bele, sed ĉiuj estas la arbo mem. Simile, la familioj estas la tuto de la socio kaj neniu el ili rajtas egoisme akapari por si mem tion, kio apartenas al ĉiuj.

La socio, kiu akceptas la familion, kiel sian subteno-pilieron, ne povas nek rajtas fari distingojn pri tiu aŭ alia familio: eĉ ne devus ekzisti privilegioj inter ili, ĉar se tio okazus, kia familio ĝi estus? Sendube ĝi ne plu estus tiu "granda kaj ronda familio" kiun aludis D-ro Zamenhof, kaj evidente ankaŭ ne tiu de la Homaj Rajtoj. Ni celas nur veni al konkludo, ke la familio ne povas esti nun io sendependa, kaj tial fremda al tio, kio okazas en la mondo. La emfazo de la familio proponita de UNO celas nur, miaopinie, instigi al solidareco kaj al pli justa socio, en kiu la homoj pli komforte vivantaj helpu al tiuj aliaj tiel senhavaj, kies granda parto mortas pro malsato kaj malsanoj. Reciproka helpo estas etike deviga, tute same kiel okazas ene de aŭtenta familio.

Mi estas defendanto de la familio, de mia familio, sed miaj pensoj tuj flugas al tiuj familioj, kiuj disvolviĝas en malbonaj vivkondiĉoj, kaj sekve ankaŭ al tiuj, kiuj vivas privilegie. Mian amon al la propra familio mi volas ankaŭ doni al tiuj, kiuj bezonas helpon. Mi eĉ ne povas trankvile manĝi sciante, ke en la sino de aliaj familioj oni ne manĝas. La koncepto familio, kiun mi pensas, etendiĝas tiel longe kaj larĝe kiel la homaro. Ĉu la Unu-



iĝintaj Nacioj pretendas revalorigi la familion metante ĝin kiel simbolon de deviga solidareco inter la homoj, aŭ tute simple ĝi deziras nur plifortigi la familion kiel parton fundamentan de la socio? Ĉu eble UNO volas nur instigi al bonaj rilatoj kaj plibonigo de la etikaj valoroj ene de la familio?

Tio, sendube estus grava eraro, ĉar ĝi emfazus la egoismon de la grupoj, kaj favorus la kreon de maljusta socio. En nia aktuala mondo ne plu sufiĉas teoriumoj aŭ predikoj, sed nepre oni bezonas, ke la parolon akompanu ĉiam faktoj, ĉar socio konsistanta el familioj vivantaj kun grandaj privilegioj, dum aliaj dronas en mizero ne estus etike tolerebla. La familio ne komenciĝas kaj finiĝas en la propra hejmo, nek konkretiĝas en la amo de gepatroj al gefiloj kaj reciproke, nia nuna familio estas ja la tuta homaro. Alia principo estas tute neakceptebla.

La kampanjo de UNO, miaopinie, ne celas do impulsi aŭ revivigi pasivajn antikvajn valorojn etikajn de la familio jam kadukajn kaj ne plu utilajn por la homaro, sed aktualigi la interhoman kunvivadon; ja alio certe ne sukcesus nek alportus ion pozitivan al la homaro. La ĉi jara slogano sin prezentas kun la profiloj de moderneco kaj kiel invito al la socio alfronti senhezite per la simbolo de la familio la gravajn problemojn pri solidareco, kiun la mondo nun travivas... Se ĝi ne sukcesas ni ne kulpigu la socion, ĉar la socio estas ni mem. La propono de UNO, estas tre valora, enorme pli valora ol multaj senpripense opinias.

La subskribanto ne sentas sin tro optimisma pri la rezulto de tiu ĉi kampanjo, kaj eblas ke post tiu ĉi jaro, proklamita JARO DE LA FAMILIO, ĉio restos neŝanĝita. Sed mi sentas min devigata esprimi mian penson pri tiu proklamo, kaj instigas ĉiujn kunlabori efektive en la celoj proponitaj. Ek al la transcenda tasko!


*Luis Serrano Pérez*

# mi ♥ vin, esperanto

# Ni estas jam eŭropaj civitanoj

En monato junio okazos en ĉiu membroŝtato de la Eŭropa Unio, la balotoj al la Eŭropa Parlamento, kaj la plej granda novaĵo rilate la antaŭajn estas la ebleco, laŭ la Traktato de Maastricht, ke eksterlandanoj partoprenos en ĝi.

La Eŭropa Parlamento (E.P.) aprobis en novembro 1993 direktivon ebligantan ke eksterlandanoj, pli ĝuste civitanoj de komunumaj landoj, partoprenu en la balotoj en la lando kie ili loĝas. Tiu direktivo estis preparita sufiĉe antaŭtempe por ke ĉiu membro-ŝtato povu prepari taŭge la novan leĝaron tiucelan. Sed la aranĝo de tiu teksto ne estis facila kaj trovis gravan obstaklon en Luksemburgio, lando kun 28% da komunumaj civitanoj ne indiĝenoj kaj kiu havas nur ses eŭrodeputitojn, kio praktike signifas multe. Pro tio, Luksemburgio petis ke tiu direktivo indiku, ke en tiuj okazoj, la rajto elekti kaj esti elektita estu kondiĉita al la fakto rezidi almenaŭ kvin aŭ dek jarojn antaŭe respektive.



La E.P. akceptis tiujn klaŭzojn, laŭ konsilo de la Komisiono pri Juraj Aferoj, sed ne permesis alian peton de Luksemburgio, en la senco ne rajtigi listojn kies plimulto estas nelandidoj. Tio lasta certe kontraŭdirus la Traktaton, kiu malpermesas tiun diskriminacion kaj ĝi do estus nuligita de la Komunuma Tribunalo.

La Traktato pri Eŭropa Unio, kaj konsekvence de la "civitaneco de la Unio", ampleksas la rajton voĉdoni kaj esti elektita al la urbaj balotoj. Tial, la direktivo nun aprobita signifos gravan antaŭeniron en la momento, kiam oni diskutos la kondiĉojn laŭ kiuj la civitanoj de la Unio uzos tiun rajton.

Kiel sciate, la "civitaneco de la Unio" garantias ne nur tiujn eblecojn, sed ankaŭ la rajton je diplomata protektado en iu ajn membro-ŝtato, laŭ la samaj kondiĉoj de la propraj civitanoj de unu el la dekdu landoj. Alia novaĵo estas la nova figuro de la *Popoldefendanto*, kiu ricevos plendojn de iu ajn civitano de la Unio, estos nomumita de la Eŭropa Parlamento kaj deĵoros kun plena sendependeco. Dum la plenumo de sia tasko, li ne povos labori en alia profesia aktivado.

La Popoldefendanto prezentos ĉiujare antaŭ la Parlamento raporton pri la rezulto de siaj esploroj.

Do, la civitaneco de la Unio malfermas multajn eblecojn ankoraŭ neantaŭviditajn plene, kaj en ĉiu tria jaro, la Komisiono informos la Parlamenton, la Konsilion kaj la Socian kaj Ekonomian Komitaton, pri la apliko kaj malvolvo de la Unio, ebligante kompletigi tiujn civitanajn rajtojn.

*M.R. Urueña*

---

# Pekoteko pekas pri la paronimoj apartamento / apartemento

*Facileco kiel esenca trajto de planlingvo*

Werner Bormann en sia pensinstiga artikolo "Mondlingvo longperiode"[1] emfazas, ke planlingvo havas sencon, nur se ĝia elstara karaktero estas facileco. Tiel ĝi povas sukcese konkurenci kontraŭ la grandaj naciaj lingvoj pri la pozicio de mondlingvo. Se la esperantistoj akceptas facilecon kiel esencan kriterion de estonta mondlingvo, ili devus ne senpripense ŝarĝi sian lingvon per tiuspecaj leksikaj eroj, kiuj postulas longan trejnadon en la lingvo por uzi la ĝustan formon sen aparta pripensado.

*Malfacilaĵoj kaŭzitaj de paronimoj*

Inter la klasoj de gramatikaĵoj kaj vortoj, kiuj prezentas problemon de elekto de la ĝusta formo, estas la paronimoj. Laŭ *Plena Ilustritra Vortaro* (PIV), paronimo estas "vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama (ekz:pesi- pezi)". La ekzemplofrazo sekvanta la difinon tekstas: "en Esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj". Mi provos demonstri, ke la paronimoj en Esperanto estas *ĉiuokaze evitendaj*!

Dum la tuta historio de Esperanto mizerigis la vivon de lernantoj (kaj ankaŭ spertuloj!) la ekzisto de paronimoj en la leksiko de la lingvo. Eble la plej malfacile paro, jam citita de PIV, estas "pesi/pezi", sed en mia kolekto da lingvaj eraroj en Esperantaj publikigaĵoj troviĝas pluraj frazoj, en kiuj verkintoj konfuziĝis pri la ĝustaj signifoj de "raketo/ rakedo", "da-

maĝi/domaĝi", "albumeno/albumino" ks. (Pli da ekzemploj troviĝas en miaj artikoloj en "KAJEROJ EL LA SUDO" kaj en "BOLETIN DE HEF"[2]. Skandala mispaŝo sur tiu ĉi tereno estis farita de d-ro André Albault, la prezidanto de Akademio de Esperanto, kiu skribis "elektrona" anstataŭ "elektronika" tri fojojn en mallonga peco![3].

Antaŭ iom pli ol unu jardeko mi verkis artikolon titolitan "Deserto en la dezerto"[4], en kiu mi pritraktis la paroniman paron "deserto/dezerto. Jen du frazoj ĉerpitaj el kuir-recepto[5].




a. "Jen en Germanio bone konata dezerto precipe ŝatata dum la varma somero (...)" (Ĉu vere? Kiu ŝatas dezertojn dum la varma somero?)

b. "Kaĉigitaj tiuj fruktoj donas guston al la tuta dezerto". (Se dezerto havas fruktojn, tio povas rezulti ne de kaĉigado sed de irigaciado!)

La aŭtorino de la recepto ne sciis la diferencon inter "dezerto" kaj "deserto"! La unua estas regiono, karakterizita per preskaŭ absoluta sekeco, tre malabunda kreskaĵaro kaj tre maldensa loĝantaro da nomadoj. Laŭ la kunteksto la bezonata vorto estas "deserto", la lasta parto de eŭropaj manĝoj, konsistanta el fromaĝo, fruktoj kaj dolĉaĵoj.

*Ankoraŭ du eraroj pri la uzo de "apartemento" kaj "departamento"*

En miaj artikoloj pri la diferencoj inter "apartamento/apartemento" kaj "departamento/departemento[6] mi atentigis legantojn pri la oftaj eraroj, kiujn okazigas la malsimetria paro "apartamento/departemento" pro la malsamaj vokaloj en la tria silabo. Ankoraŭfoje mi volas emfazi,ke ne nur komencantoj aŭ lernantoj faras la erarojn. Stumblas ankaŭ plurjaraj uzantoj de Esperanto kaj eĉ leksikografoj! La sekvaj du citaĵoj konsistigas okulfrapan pruvon.

1. En la ĵus eldonita *Grand Dictionnaire Français-Espéranto*, sub la kapvorto *chef-lieu* troviĝas jena ekvivalento en Esperanto: "departamento, kantona ĉefurbo". Faris tiun eraron franclingvuloj, en kies lingvo la vorto *département* fariĝis la etimo de la Esperanta vorto "departemento".

2. Al la ekzemploj ilustrantaj eraran uzon de la du vortoj en miaj antaŭaj artikoloj, mi deziras aldoni jenan citaĵon el artikolo verkita de membro de Akademio de Esperanto: "Poste li veturigis min al sia loĝejo, en la plej alta etaĝo de apartementa domo (...)" (R. Eichholz; Vojaĝ-raporto 1988, pĝ. 3[7]).

*Registrado de la eraro en PEKOTEKO*

Rüdiger Eichholz, la kompilanto de PEKOTEKO (= *Per-Komputora Termino-Kolekto*), ne volante prudente forgesi sian eraran vortuzon sen plua komento, obstine provis pravigi la aperon de la vortformo "apartemento" en la publikigita vojaĝraporto. Li registris ĝin en sia elektronike kompilata terminaro kaj, per pedanteca komento, donas al "apartemento" la signifon "samnivela ordinara ĉambraro" kaj al "apartamento" la signifon "luksa loĝejo"[8]. Tiu propono estas didaktike malpravigebla. Ne estas konsilinde ŝarĝi Esperanton per ankoraŭ unu paronima paro. Por esprimi la nuancitan semantikan diferencon, sufiĉas diri tutsimple "luksa apartamento". Eichholz, per la enkonduko de "apartemento" semas senliman konfuzon, ĉar estos necese revizii ĉiujn Esperantajn vortarojn. Tio estas ankoraŭ unu peko de PEKOTEKO, kiun oni devas kategorie rifuzi.

*Malbonaŭgura evolutendenco*

Lastatempe estis registritaj en la *Suplemento* de PIV ankoraŭ du paronimoj: "akĉento" kaj "ŝabato" apud la jam ekzistantaj "akcento" kaj "sabato". Estas evidente, ke la diletantaj verdaj vortaristoj tute neglektis la saĝan averton de d-ro Bormann. Se tiu tendenco daŭre krei novajn paronimojn ne estos bremsita, mi prognozas, ke la sekvaj generacioj de uzantoj de Esperanto alfrontos pli kaj pli malfacilan lingvon.

*Bernard GOLDEN*


*Notoj*

1. Werner BORMANN. Mondlingvo longperiode. Pĝ. 95-107 en *Serta Gratvlatoria in honorem Juan Régulo*. Vol. II: Esperantismo. La Laguna:Universidad de La Laguna: 1987. 790 pĝ.
2. Bernard GOLDEN. For la paronimismon. "Kajeroj el la Sudo", Decembro 1989, n-ro 4, pĝ. 13-15. Bernard GOLDEN. La plago de paronimoj en Esperanto. "Boletín de la Federación Española de Esperanto", julio-aŭgusto 1989, n-ro 291, pĝ. 14-16.
3. André ALBAULT. Komput/oro, -ilo aŭ...? "Monato", decembro 1989, pĝ. 5. Bernard GOLDEN. For la fuŝgvidantoj! -Vivu la revolucio! "Monato", marto 1990, pĝ. 4.
4 Bernard GOLDEN. Deserto en la dezerto. "FILOLOGO", aprilo 1981, n-ro 18, pĝ. 2-4. Publikigita ankaŭ en "OOMOTO", januaro-junio 1981, pĝ. 55-58.
5. Vilma EICHHOLZ. El mia kuirejo. "LUMO" (Kanada Esperanto Revuo), somero 1980, pĝ. 24.

6. Bernard GOLDEN. La ortografie konfuza vorto "apartemento". "STARTO", 1993, n-ro 1 (154): 17-18.
Bernard GOLDEN. Kial oni skribas "departamento" en Esperanto? "KAE-Informilo", aŭtuno 1992, n-ro 25,pĝ.4-5.
Bernard GOLDEN. Apartamento- ortografie konfuza vorto. "The Worker Esperantist", printempo 1993, n-ro 388,pĝ.7.
Bernard GOLDEN. La diferencoj inter "apartamento/apartemento" kaj "departamento/departemento". "Nia Bulteno", aprilo-junio 1993, n-ro 61, pĝ. 10-11.
7. Rüdiger EICHHOLZ. Vojaĝ-raporto 1988. TC 88/6, pĝ. 1-6. Terminologia Centro de ISAE, Baillieboro, Ontario, Kanado.8.
Rüdiger EICHHOLZ (kompilanto). *Per-Komputora Termino-Kolekto*. (PEKOTEKO). 93/134.

---

# VIDI LIGNERON EN OKULO ALIULA, SED EN SIA PROPRA NE RIMARKI TRABON



Rilate la kunlaboraĵon de Georgo Kamaĉo, aperintan en "Boletín" n-ro 314, paĝojn 24 ĝis 28, mi tuj sekve precizigas kelkajn el liaj konceptoj, kiujn mi respektas, sed ne povas akcepti kiel ĝustajn, ĉar ilin ŝajne li formulas ignorante la komunasentan logikon, helpe de kiu ja D-ro Zamenhof kreis sian Deksesregulan Gramatikon, kiun li leĝigis kiel Fundamentan.

S-ro Kamaĉo mem tion konfirmas per jena lia aserto: "Mi ne interesiĝas pri lingvo absolute logika. Eĉ pli: mallogikeco kaj nelogikeco logas kaj ĉarmas min". Sekve, koheran kaj konsekvencan rezonadon aŭ argumentadon s-ro Kamaĉo preteratentas, en klara opozicio al la kriterio de D-ro Zamenhof, kiu ja diris:"La vera stilo Esperanta estas nur stilo simpla kaj logika" kaj krome: "En lingvo arte farita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis".

Do, kohere al tio, kion la Majstro instrukciis, s-ro Kamaĉo ne kritiku la logikan "regurbo" (=urbo de reg-ad-o), ĉar laŭ la strukturo de Esperanto "ĉefurbo" (=urbo de ĉefo-j), same kiel "ĉefkaskedo" (=kaskedo por aŭ de ĉefo), "ĉefprelego" (=prelego de ĉefo) ktp., inkludante la ofte —anstataŭ "precipe"— misuzatan "ĉefe" (=kiel ĉefo), nur povas racie kaj laŭFundamente signifi la respektivajn interparenteze indikitajn ekvivalentojn.

Majuskligon de nomoj s-ro Kamaĉo ŝajne rifuzas, kaj rilate la Internacian Lingvon, li specife argumentas, ke "la vorton esperanto ne ĉiu skribas per majusklo", kaj li plu daŭrigas: "Mi ĝin skribas minuskle, samkiel (apudmetaĵo duvorte skribenda, t.e., "same kiel", ĉar adverbo ne estas eliziebla en Esperanto!) la vortojn volapuko, sanskrito kaj latino". Tiukoncerne estu klarigate, ke mi preferas —kaj ne la sola— skribi per majusklo ne nur la nomon Esperanto, tiel sekvante la tradician kutimon de D-ro Zamenhof kaj liaj plej eminentaj disĉiploj, sed ankaŭ ĝian epiteton: Internacia Lingvo, konvinkite obeante iaman konsilon de la karmemora Akademiano profesoro Ivo Lapenna. Cetere, tiun nian kriterion pri majuskligo de propraj nomoj forte subtenas, inter aliaj, la bedaŭrataj Akademianoj prof. Waringhien kaj d-ro Kalocsay
en sia Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.

Estas domaĝe, ke s-ro Kamaĉo uzas tiom krudajn vortojn por miskvalifiki idealismajn samideanojn —inter kiuj sin sentas aludita la subskribinto—, longatempe strebantajn por la progresigo de Esperanto, kaj kies sola peko ŝajne estas ilia daŭra apliko de la de Zamenhof rekomendita logiko al lia Deksesregula Gramatiko. Kiel proksimume sentencas la Hispana proverbo, per kiu mi titolas tiun ĉi kunlaboraĵon, s-ro Kamaĉo "vidas pajleron en okulo aliula, sed en sia propra li ne rimarkas trabon"...

Krom lia diskutinda, ĉar ne ĉiam laŭ-Fundamenta lingvaĵo, mi aparte volas lin atentigi pri lia nepra devo aktualigi sin rilate la rekomendojn de la Akademio de Esperanto, kies membro li estas. En sia unua recenzo, aperinta en la revuo ILTIS-Forumo, s-ro Kamaĉo incite skribas: "La libron tradukis Rikardo Ŝulco; kiel oni diras en mia kvartalo, roman-tradukon *far* (la kursivigo estas mia) Ŝulco oni legu du fojojn: la unuan kaj la lastan". Al tio ĉi replikis profesoro Ŝulco jene: "En via kvartalo oni parolas pri Ŝulco Rikardo. Sed tre bona ĝi ne estas, tiu tie parolata Esperanto. Ĉu vi ne konas la sesan regulon de la Gramatiko Deksesregula? Ties lasta frazo estas: "La prepozicio ĉe la pasivo estas DE". Se ĝi estas DE, ĝi ne estas FAR". Efektive, antaŭ proksimume 10 jaroj, la Akademio de Esperanto malrekomendis la uzadon de FAR anstataŭ FARE DE. Tion do notu ĝia membro Kamaĉo!

Krome s-ro Kamaĉo refoje kritikas, ke "nome de ia preterhoma kaj supernatura logika interrilato, kiu kontraŭas ne nur mian lingvosenton, sed ankaŭ tiun de Zamenhof mem, la ŝulcistoj neniam uzas "sia" en frazoj, kiaj: "Li suprenigas la kolumon de lia eluzita vintromantelo", "Ariko sidis ĉe la lito de lia patrino" ktp. Nu, per tiu lia senbaza kritiko evidente manifestiĝas, ke s-ro Kamaĉo aŭ ignoras la konsilojn de la Akademio de Esperanto, aŭ tute ne atentas ĝiajn decidojn. Efektive, se li tralegus la numeron 50 de

"Boletín" de julio-aŭgusto 1971, en ĝi li konstatus, ke la Akademio de Esperanto oficiale komunikis, inter aliaj konsiloj, la jenan rekomendon: "Foje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj: "kiu(j) est-", ekzemple: "Li ekvidis sian fraton Benjameno, la filon de *lia* patrino =B., kiu estis la filo..." Z. Analogaj ekzemploj, ĉiuj same Zamenhofaj, estas troveblaj en Plena Analiza Gramatiko de Esperanto kaj, aparte ĝisfunde analizitaj, en Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto, KOMPLEMENTA VOLUMO, ili estas: "Li trovis la leteron de la kamarado de lia filo", "La popolo ne turnis forte sian koron al Dio de ĝiaj patroj", "ĉiu el la Izraelidoj devas resti ĉe la posedaĵo de la tribo de liaj patroj", "en la tria jaro de lia reĝado, li faris festenon por ĉiuj siaj princoj" ktp. Ĉu tio ĉi ne jam sufiĉas?.

Fine mi diru, ke nur kun plena respekto al la stabila, leĝodona Fundamento de Esperanto, precipe al ĝia lingvobaza Gramatiko, estas iel akceptebla la propono, kiun faras s-ro Kamaĉo en la lastaj linioj de lia artikolo: "ke ekzisto de diversaj interpretoj de pluraj eroj kaj aspektoj de Esperanto estas tute sendanĝera por sana evoluo de la lingvo". Tamen, mi insistu, ke malatento de la baza kodo, t.e., de la Fundamento, tiel senkontrole evoluigante Esperanton, tio ja estus rekta paŝo al ĝia nerekonebla degenero kaj disdialektiĝo. Simila ĥaoso kontraŭregula, ekzemple okazus, se ŝakludisto dum matĉo movus la reĝon du paŝojn antaŭen; aŭ se dum partio de futbalo iu avanulo impulsus la pilkon, per la mano, en la rivalan golejon...

*V. Hernández Llusera*
*Simpatianto de la t.n. "Analiza Skolo"*

---

# La Coruña

## Reago al propono de Bernard Golden

En sia artikolo *Problemoj rilate la esperantigon de La Coruña* (*Boletín*, n-ro 313, p. 19-20) Bernard Golden preteratentas la fakton, ke temas pri urbo en Galegujo, lando kun propra oficiala lingvo: la galega. Tial oni esperantigu la urbonomon ne el la hispana aŭ kastilia, sed ja rekte el la galega mem.

La galega nomo de tiu urbo estas, laŭ mia scio, *A Coruña* aŭ *A Cruña* (ŝajne ekzistas tri konkurencaj ortografioj por la galega lingvo). Kiel esperantigi ĝin?



Unue, simile al **La-Pazo** kaj **Los-Anĝeleso**, mi konservus la artikolon "se necese", sed neniakaze fandus ĝin al la loknomo. Kial ne? Simple tial, ke temas nur pri artikolo, kiu ekzemple forfalas okaze de derivado (almenaŭ en la hispana): *coruñés*, *paceño* (loĝanto de *La Paz*), *angelino* (de *Los Ángeles* aŭ *Los Angeles*). "Se necese", ĉar foje la artikolon oni povas tute bone neglekti: la esperantigo de *El Salvador* estas nenio alia ol la nura **Salvadoro**, konforme al la hispana adjektivo *salvadoreño*. Tio ebligas elekti du apartajn anecajn adjektivojn, kun aŭ sen artikolo, kiel jene: **paza** aŭ **la-paza**; **pazano** aŭ **la-pazano**; **anĝelesa** aŭ **los-anĝelesa**; **anĝelesano** aŭ **los-anĝelesano** kaj plu simile.

Fakte la kunfandado de artikoloj kaj prepozicioj kun la sekva lok- aŭ person-nomo rekte kondukas al la bizaraj monstraĵoj de Rikardo Ŝulco: **Honorato Debalzako, Volfgango Degojto, Petro Kalderono Delabarko**... (cite el ties klare malrekomendinda libro *Sur la vojoj de la Analiza Skolo*, p. 229).

Due, mi kontraŭas transskribadon de la hispanaj fonemoj *ñ* kaj *ll* per respektive **nj** kaj **lj**. Tiaj transskriboj plenigas la tekstojn per superfluaj kaj okul-vundaj joj (cetere mem tre oftaj en esperanto). Estas iom strange, ke oni provas redoni tiujn fonemojn per duopaj konsonantoj, kvazaŭ por malhelpi, ke la esperantigoj enhejmiĝu en la internacia lingvo! Prefere oni asimilu per la bele simplaj **n** kaj **l** konforme al la zamenhofa **Sevilo**. Ne pro nenio mi elektis la formon **paelo** en mia satira novelo *La Majstro kaj Martinelli*, kiun ĵus reeldonis *Iltis-Eldonejo*.

[Parenteze: samkiale mi preferas grafisman transskribon de la urbonomoj *Jaén*, *Guadalajara* kaj *Huelva* kiel **Jaeno**, **Gvadalajaro** kaj **Huelvo**. Lastkaze atentindas formo retrotirebla el la loka adjektivo (**Onubo**, **onubano** el *onubense*), paralele al la tre oportuna **Bonaero** (**bonaerano** ege similas al *bonaerense*, dum la piva **buenos-ajresano** impresas plumpe kaj fremde). Krome oni ne forgesu, ke ofte necesas kompromiso inter pluraj lingvoj; bona ekzemplo de tio estas la komuna interkonsento pri la rivernomo **Taĵo**, lanĉita de L. H. Knoedt en *La Luzidoj*, fare de portugalaj kaj hispanaj esperantistoj.]

Resume, mi, ne sciante la galegan, subtenus esperantigon similan al **Koruno** aŭ **A-Koruno**, kvankam tre povas esti, ke korunaj aŭ galegaj esperantistoj preferus formon kun **nj**. Kun scivolo kaj intereso mi atendas ilian ĉi-teman opinion.

*Georgo Kamaĉo*

# Pri dialogoj kaj aliaj temoj

Plej elkoran dankon al amiko Valén pro ties recenzo (*Boletín*, novembro-decembro 1993) rilate la duan eldonon de mia "Nuevo método de esperanto para clases y autodidactas". Mi aparte ĝojas, ke super ĉia eventuala influo de amikaj sentoj, Valén esprimis sian opinion honeste kaj sincere kaj kritikis kion li trovis kritikinda.

Ekzemple, li diras:"la dek dialogoj, kiuj garnas la libron, fakte superfluas. Mi konas plurajn homojn, kiuj lernis esperanton per tiu ĉi libro kaj, laŭ mia scio, mi estas la sola, kiu legis la dialogojn; ja ĉiuj aliaj prifajfis ilin, eble prave".


Se li asertas tion, kaj mi, de mia flanko, skribas sur paĝo 14a de la Metodo, ke "la columna vertebral de las lecciones o unidades del libro son los diálogos", evidentas, ke, aŭ mi kulpas gravan eraron aŭ Valén miskomprenas la funkcion de la dialogoj.

Mi celis per ili proksimigi la lernantojn al tio ne facile asimilebla, kiu nomiĝas "spirito de la lingvo" kaj

kuŝas en la frazeologio, en la karakterizaĵoj de la esperanta sintakso, en la fluo de la stilo, resume en ĉio, kio faras la lingvon viva. Kompreneble ĝisfunda alproprigo de la spirito de la lingvo okazas nur post longa ekzercado, studado kaj provado super la elementoj transgramatikaj, kies posedo, aŭ ne, signas la limon inter la bona kaj la fuŝa esperantisto. Se, kiel asertas Valén, iuj lernantoj ignoras la dialogojn, des pli malbone por ili, ĉar se ili volas serioze dediĉi sin al la lingvo, ili nepre devos poste studi, memorigi kaj praktiki similan materialon el aliaj fontoj.

Bonega lernolibro por poloj estas la 320-paĝa "Ĉu vi parolas esperante?" de *Andrzej Pettyn*. Nu, ĝi havas, ne dek dialogojn, sed dudek ok, kaj ili

konsistigas, kiel en mia Metodo, la spinon de la verko. La "Nouveau Cours d'Espéranto", de *Ludwig* kaj *Triolle* same havas serion da dialogoj kiel bazan materialon. Ne valoras longigi ĝistede la liston. La pliparto de la lernolibroj esperantaj kaj naci-lingvaj posedas, kiel instruan fundamenton, dialogojn aŭ similaĵojn, kion amiko Valén tre bone scias. Eble miaj dialogoj vidiĝas tro longaj aŭ interes-mankaj, sed tio ja estas tute alia afero.



Interesan rimarkon faras Valén rilate la vort-kunmetadon, kiun li opinias "la plej komplika esperanta gramatikaĵo por hispan-lingvanoj", kaj li konsilas, ke mi "pliampleksigu tiun ĉapitron por (eventuala) tria eldono". Mi konsentas kun li ĉi- rilate, kvankam la kunmeto-sistemo ne ŝajnas al mi tiel komplika, se oni ĉiuokaze atentas pri la gramatika kategorio de la interligotaj leksemoj.

Nu, post ĉi komentoj al la punktoj starigitaj de Valén, mi ne povas ne mencii —eĉ kun forta dozo da indigno, mi konfesas— la senkonsultan manipuladon al la teksto de mia lernolibro.

Ekzemple, en la unua eldono, sur paĝo 69a, unua kolumno, linioj 10a, 11a kaj 12a legiĝas: "en tia horo nur la mort-kondamnitojn oni eldormigas por ilia ekzekuto". Nu, en la dua eldono, anonima mano, kiun mi volas kredi bonintenca, ŝanĝis senkonsulte "eldormigas" al "endormigas" sen konscii, ke per tio absolute absurdiĝas la senco de la frazo.

Sur la paĝo 157a, dua kolumno, la anonima mano daŭrigas la buĉadon. En la unua eldono, linioj 13a kaj 14a legiĝas en ĝusta hispana ortografio la vorto "entusiasmo". Sed la hanta fantomo kaprice ŝanĝis ĝin, en la dua eldono, al "entuziasmo".
Kial, je Dio, kial? Tuj poste, sur linio 16a, oni legas en la dua eldono la fusaĵon "ironizae" anstataŭ la ĝusta "ironizar"
de la unua eldono.

Sur la sama dua kolumno de la sama paĝo, linioj 1a kaj 2a, la ĝusta silabdivido "Has-ta" de la unua eldono transformiĝas en la eraran "Has-ta" de la

dua eldono pro mi ne scias kia stranga impulso de iu, kiu ne degnis antaŭe konsulti kun mi pri siaj "plibonigoj".

Mi supozas, ke la eldonisto de mia Metodo ŝuldas al mi

ian klarigon pri la apero de tiel surprizaj kaj ĝenaj anomalioj. Mi ĝin atendas.

*Fernando de Diego*

---



## Recenzoj

**Esperanto-katalogo de UEA**
Universala Esperanto Asocio, 1994,
Rotterdam, 160 p. 21cm.

Venis la katalogo de UEA, la inventaro de niaj "monumentoj". Nova formato (A5), duoble pli granda ol la antaŭa, kun pli moderna kaj, konsekvence, alloga ekstera aspekto. Aplaŭdego!

Ankaŭ ĝenerale bela grafika prezento interne, kun interesaj variantoj rilate al la antaŭaj eldonoj. Aplaŭdo!

Tamen la anoncoj ne nur malmultas sed, kun esceptoj, ili aspektas ne profesiaj, kun tre fuŝaj fotoj. Bato!

Absolute enigma estis ĉiam por mi la ĉi-kataloge konservita kriterio laŭ kiu, ekzemple, la fako "Terminaroj" antaŭas la fakon "Antologioj". Sed ĉu vere ekzistas praviga kialo, kiun mi pretervidas. Mi dubas, kaj kvankam, feliĉe, la enhav-tabelo helpas... Bato!

En la enkonduko, oni asertas, ke "la katalogo ne plu povas enteni titolojn, de kiuj restas malmultaj ekzemplerojn aŭ kiujn la merkato ignoras." Nu, kiel eldonisto mi komprenas ĉi sintenon, sed kiel uzanto mi ne povas akcepti ĝin kun kontento. Bateto!

Pli da fakoj kaj duobligo de aliaj, ekz-e poezio, en du partojn, laŭ tradukoj kaj originaloj, faras la katalogon pli reala kaj facile uzebla, kaj la informojn pli alireblaj. Aplaŭdego!

Bona ideo estas subdividi la fakon "biografioj" laŭ la nomoj de ĉiuj biografiitoj. Aplaŭdego!

Resume: necesas plibonigoj, tamen gratulojn al UEA pro la trafa kvalita kresko.

*Miguel Gutiérrrez Adúriz*

**Depósito Legal: Z-334-90**
**Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas**